# LA JUNA PENSO

ISSN.0337.5838
131-132

## ORGANO DE LA JUNULFAKO DE SAT

AUGUSTO GIS
NOVEMBRO 1979

DUOBLA
NUMERO




L A  J U N A  P E N S O
67 AV. GAMBETTA, F 75020 PARIS

DUMONATA ESPERANTO-GAZETO
PĈK: LA SOURCE 34 268 70 Z

Tiu numero fakte aperas en julio 1980. Kvankam "duobla" ĝi kalkuliĝas kiel ununura en la abonoj.

PREZO: 4 FF

# ENHAVO


pa$\hat{g}$o

3-6 ALTERNATIVAJ KURACMETODOJ, de Bert de Wit, NL.

7-10 PENSOJ PRI KOMUNIKADO, de Judith Junger-Korpershoek, NL, afable permesita transpreni ĝin el revuo: Sekso kaj Egaleco.

10 Humuro, de Kreŝo

11-13 LA ĈIELON ANTAŬ LA PARADIZO, de Karl Pov, NL.

13 FILATELISTOJ EN SAT-JUNULFAKO, de Roland Tierce, F.

13 NI VOLAS SCII PRI SAT

13 RAPORTOJ EL KATALUNLANDARO, de Jesuo

14 NI KONGRESOS EN RIJEKA, de Lumo.

14 PLIBONIGU LA MONDON, KOMENCU ĈE VI MEM., Movado sen nomo, B.

15-16 TRA LA MONDO IRAS NOVA RADIADO, la redakcio de Ekoperanto afable permesis min transpreni iom da materialo.

16 ALVOKO por helpi en la mueleja projekto.

16 PER ESPERANTO POR SOCIALISMO

17-18 PACISTA FRAKCIO

18 VIVO DE LA SAT-JUNULFAKO


---

KARAJ,

Jen la 131/132a numero de LJP. Bedaŭrinde ĝi ankoraŭ ne estas ĝisdata sed eble baldaŭ.
En ĉi tiu loko mi volas danki al ĉiuj miaj geamikoj kiuj helpis min por prepari ĉi tiun numeron, ĉu per verkado, ĉu per permeso transpreni artikolojn, ĉu per desegnado.
Pro diversaj kaŭzoj mi ne sukcesis pli frue pretigi la numeron sed nun ke ĝi estas preta mi esperas ke vi legos ĝin kun plezuro.
Bedaŭrinde mi ne povos veni al Ryeka, tial mi deziras al vi ĉiuj bonan kaj fruktoplenan kongreson.
Espereble la JF-prizorgantaro sukcesis trovi solvon por la LJPa problemo.

ĝis

Loes

La stencilojn ni ricevis komence de majo. La multobligado ne eblis antaŭ (niaj) lernejaj libertempoj.
JFK

**ALTERNATIVAJ KURACMETODOJ. KIO ESTAS ?**

En la pasintaj jaroj en la okcidenta mondo pli kaj pli da interesiĝo ekestis pri la t.n. alternativaj kuracmetodoj. La fenomeno de la akupunkturo estas konata. Fakte nur post la vizito de Nixon al Ĉinio en '72a la okcidenta mondo grandskale interesiĝis kaj konatiĝis kun la orienta medicino. Sed ni ne pensu, ke nur akupunkturo aŭ jogo aŭ makrobiotiko estas alternativaj kuracmetodoj aŭ vivmodeloj. En diversaj okcidentaj landoj jam ekzistis antaŭe formoj de ne-oficialaj kuracmetodoj, kiuj kelkfoje jam ekzistis dum kelkaj jarcentoj. Oni povas citi la homeopation, kiun "inventis"la kuracisto Samuel Hahnemann en la 18a jarcento kaj kiu konis tempojn de florado kaj malprospero. Ankaŭ la Mesmerismo, laŭ la nomo de la aŭstra-franca kuracisto Mesmer, ankaŭ nun alibaptita en "paranormala medicino", precipe konata en Nederlando, estas ekzemplo de alternativa kuracmetodo, kiu jam estas sufiĉe malnova kaj kiu havas okcidentan radikon. Oni povas plie pensi pri la naturmedicino, kiu fakte fontas jam el la antikva pensado de Hipokrato kaj kiun nun ankaŭ kuracistoj kaj ne-kuracistoj praktikas. En tiu naturmedicino oni klopodas tikli la naturan resaniĝan kapablon, la "vis medicatrix naturae" laŭ la latina. Por tio oni utiligas ĉiajn naturajn rimedojn, ekz.ebanado, spirterapio, herba terapio, sangelverŝo, k.t.p.
Fakte dependas de la lando, en kiu oni vivas, kio estas konsiderata kiel alternativa kuracmetodo. En Hindio ekz.e oni havas tute apartan medicinon, "Ajur-Veda", kiu disvolviĝis en tiu lando dum multaj jarcentoj. Same kiel la ĉina medicino natura ĝi estas riĉa fonto por nuntempaj sciencistoj. Kaj same kiel tiu ĉina naturmedicino en Ĉinio, Ajur-Veda havas sufiĉe da prestiĝaj praktikantoj en Hindio. Ekzistas eĉ same multaj kolegioj pri la hinda medicino ol pri la okcidenta medicino, kiu fakte estas la reganta medicino en la okcidentaj landoj (ankaŭ en Orient-Eŭropo).
Ankaŭ interne de diversaj okcidentaj landoj, la kuracmetodo, kiu estas en unu lando konsiderata kiel alternativa, povas esti tute oficiala, "regulara", en aliaj landoj. La kuracbanado estas tute alternativa afero en ekz.e Nederlando. La malsanasekuro, ĉu sociala, ĉu privata, ne pagas por restado en tiaj kuracbanejoj. En Federacia Respubliko Germanio kontraŭe, tiu restado estas tute oficiale pagata de la malsanasekurkompanioj. Kiropraktiko, kiu estas tre bone konata kuracmetodo en Usono (ĝia lando de origino) kaj aliaj anglosaksaj landoj, finfine en la komenco de la sepdekaj jaroj estis en preskaŭ ĉiuj ŝtatoj usonaj akceptita leĝe. Do, povas esti, ke tio, kio nun estas alternativa, povas esti "regulara" post deko(j) da jaroj. Tamen la reprezentantoj de la oficiala medicino ofte forte kontraŭbatalas iun ajn oficialigon de tiuj t.n. alternativaj metodoj. Do necesas iom pli profunde rigardi, kial oni nomas tiujn metodojn alternativaj.

**KIO SIGNIFAS "ALTERNATIVA"?**

Ni jam supre vidis, ke kuracmetodo fariĝas "alternativa" pro sociaj kialoj. En diversaj socioj oni povas trovi tre diversajn formojn de sanplibonigaj, sanforigaj kaj malsankontraŭa kondutoj, kiuj ligiĝas al difinita kulturo kaj kiuj pro tio havas do regantan karakteron.
"Alternativa" signifas pri kuracmetodo ke:

1) la utiligado de tiu kuracmetodo kreas problemojn por la paciento, ĉar la socia aŭ privata malsanasekuro ne repagas la kostojn pro tiu metodo faritaj. Aŭ almenaŭ ne ĉiam oni repagas. Homeopatiaj medikamentoj ekz.e en Nederlando estas nur pagataj de asekuro, se la familia kuracisto preskribis tiujn medikamentojn. Se oni ne havas homeopatian kuraciston, oni devas iri al alia kuracisto ol la familia kaj tiam la asekuro ne pagos. Same pri la antroposofia medicino kaj akupunkturo. Pacientoj, kiuj serĉas sian savon ĉe Mesmeristoj, la t.n. paranormalaj kuracantoj, ja tute ne povas esperi pri repago, ĉar la kuracantoj ja ne estas kuracistoj. Eĉ estas ankoraŭ tiel laŭ la nederlanda leĝo, ke ili ne rajtas praktiki, ne estante kuracistoj. Tio ankaŭ estas la kazo en Belgio, Francio kaj orient-eŭropaj landoj ekz.e. Sed en Germanio federacia ekzistas leĝe agnoskitaj "Heilpraktiker" (kuracantoj), kiuj rajtas praktiki inter certaj limoj. Alilande (Britio, Skandinavaj landoj), ne estas strikta monopolo por kuracistoj al praktikado de medicino, sed tiuj kuracantoj estas pli malpli limigitaj en sia aktiveco.
La leĝoj en [illegible], Aŭstrio ekz.e postulas ke la kuracistoj apliku nur "science agnoskitajn metodojn". Kaj tiukaze oni diras, ke la metodoj kiaj estas akupunkturo, homeopatio kaj similaj, ne estas science pruvitaj. Do, oni kiel kuracisto eĉ ne rajtas apliki ilin. Riske de puno aljuĝita de kontrola instanco.
Ke asekurokompanio ne pagas por aktivaĵoj de kuracantoj, estas sufiĉe kredebla afero. Ĉar oni ja volas pagi al homoj, kiuj "kompetentas" kaj ne al ĉarlatanoj.

2) la alternativa kuracmetodo ne estas instruata en universitatoj en la normala medicina instruado. Povas esti, ke oni kiel kuracisto povas poste specialistiĝi pri ekz.e homeopatio en iu universitato, sed ofte tiuj docentoj estas privatdocentoj. Kelklande tamen ankaŭ pli malpli oficialaj docentoj. Ekz.e por la manteknika medicino en F.R.G.-universitatoj.Sed neniu ankoraŭ instruas akupunkturon en okcidentaj landoj en universitato. La kaŭzo de tio kuŝas en la fakto, ke la medicina scienca komunumo konsideras tiujn metodojn "ne sciencaj", aŭ "ne science pruvitaj". Tio implicas, ke oni konsideras la oficialan medicinon en ĉiuj ĝiaj fakoj kaj disĉiplinoj jes science pruvita. Tamen oni plurfoje aŭdas ke metodoj aŭ medikamentoj, kiujn oni kredis "science pruvitaj kaj efikaj", poste montriĝas ne tiel efikaj kiel oni supozis. Por klarigi la efikojn de la t.n. alternativaj kuracmetodoj oni tre rapide emas alskribi tiujn efikojn al "sugesto", " placebo-efiko"(placebo-efiko estas efiko de ŝajn-medikamento. ekz.e sukerpilolo, kiun oni (t.e. la kuracisto) al la paciento kredigas esti la plej nova kaj hiperefika medikamento kontraŭ la malsano de la koncernato.).

Oni povas sin demandi, kial la scienca komunumo medicina (en la okcidento) kredas kelkajn metodojn ne "sciencaj". Ofte mankas sufiĉe da esploroj, eksperimentoj sciencaj pri la metodoj, kiujn oni priskribas kiel "ne-sciencaj". Kial oni ja ne pli bone studis tiujn metodojn?
Estas kelkaj kialoj por tio. Unue povas esti ke la scienca, teoria bazo de iu terapio aŭ kuracmetodo kontraŭas la kutimajn, akceptitajn medicinajn konceptojn. Povas ankaŭ esti ke pro teoriaj konsideroj el naturscienca vidpunkto ofte, oni neas ke la efiko povas esti kaŭzata de la koncerna terapio aŭ kuracmetodo.
Ekz.e en Nederlando estas iu kuracisto, kiu pretendas ke li povas kuraci kanceron per dieto. Nu, ĉiuj medicinistoj ja ne povas kredi ke dieto povas kuraci kanceron. Ili ofte agnoskas, ke malbona nutraĵo povas estigi kanceron (nuntempe ne plu problemo, klarigi tion, sed antaŭ dekoj da jaroj oni ankoraŭ neis tion ofte). La homeopatio, en kiu oni utiligas "potenciigitajn medikamentojn "(ofte dekoj da fojoj dek- aŭ centfoje "diluitaj"): Laŭ la natursciencoj ne plu povas esti iu molekulo de la aktiva substanco en tiu diluaĵo, aŭ tre malmulte. Ekz.e preparaĵo D 30 laŭ fizikaj konsideroj ne plu povas havi en si aktivan molekulon. Povas ankaŭ esti ke la terminoj, en kiuj oni klarigas la efikojn de kuracmetodo, estas tute ne kompreneblaj por moderna naturscience edukita esploristo. Tiel ke oni ne povas eksperimenti laŭ la konataj metodoj en la medicina scienco.
Akupunkturo deiras de iu vivoforto, Ĉi, kiu cirkulas tra meridianoj sur la korpo. Neniam oni per mikroskopo oni trovos tiujn kanalojn. Kaj la konceptoj pri "Jin" kaj "Jang" estas tute fremdaj por la okcidenta kapo. Kaj do... sensencaĵo. Ofte oni ne volas serioze enprofundiĝi en aliaj pensmodeloj, deirante de aliaj konceptoj, aliaj t.n. paradigmoj.Paradigmo en la medicino estas iu klasika ekzemplo en la teoriformado, laŭ kiu oni konsideras la fenomenojn. Okazas kelkfoje ke paradigmoj en la scienco estas renversataj kaj anstataŭigataj de aliaj paradigmoj. Tiel estis pri la sunsistemo de Ptolemeo, kiu kredis ke la tero estas la centro de la sunsistemo. Galileo antaŭenpuŝis la modelon kun la suno en la centro. Ankaŭ en la fiziko la pensmodeloj ŝanĝiĝis en la daŭro de la tempo. Atomo estas fakte nur koncepto en la homa idea mondo. Neniam oni povis palpi ĝin.

Sed, estas malfacile kredi je iu "animala magnetismo" aŭ iuspeca energio, kiu povus esti transdonata de unu persono al alia, tiel ke ĉi-lasta resaniĝus. Sciencistoj ne povas per siaj instrumentoj konstati iun transiron de energio en kiu ajn formo (varmo, lumo, elektro k.t.p.) kiam paranormala kuracanto movas siajn manojn super la korpon de paciento.
Ofte scienca esplorado estas ankoraŭfoje multe pli malfaciligata, kiam oni diras, ke oni tre individue traktas pacienton. Ekz.e en la homeopatio oni ankaŭ konsideras la plej etajn karakterajn trajtojn kaj ĉiuspecaj ŝajne ne tuj gravaj cirkonstancaj donitaĵoj. Pro tio ofte la homeopato bezonas multe pli da tempo ol la regulara kuracisto por fari diagnozon. Statistikoj ne multe utilas en tia kazo. Ĉar por statistikoj oni kunigas la homojn, rigardante nur al iu specifa trajto, ne al aliaj. Povas ekz.e esti, ke ŝajne samaj plendoj de pacientoj kondukas al tute malsamaj medikamentoj.

Se tamen la ne-oficialaj metodoj ofte havas sukceson ĉe pacientoj, kiuj jam delonge klopodis "regulare""resaniĝi", sed vane, la klarigo estas "sugesto", "placebo-efiko". La fakto, ke multaj pacientoj simple foje volas elverŝi sian koron povas ankaŭ esti kialo por sukceso. Ĉar pacientoj en la normala praktiko de regulara kuracisto ofte ne trovas kontentigon. Post kvin minutoj ja la aŭskultado estu finita. Atendas multaj aliaj...

*Oni ankaŭ diras, ke la ne-oficialaj kuracantoj aŭ kuracistoj havas iun "magian influon". Tio estas la arta aspekto de la medicino, kiun ĉiu kuracisto ja en la praktiko povas observi kaj kiun oni iom post iom volas forpuŝi, ĉar ĝi ja ne estas "scienca".*
*Nu, la nocio "alternativa" per ĉi tio ŝajne estas sufiĉe priskribita. Restas la nocio: kuracmetodoj.*

*KIO ESTAS KURACMETODO?*

*Ofte inter la t.n. kuracmetodoj estas simplaj terapioj. Ekz.e la ĉelterapio, kiu utiligas ĉelsuspensiojn de ŝafoj kaj kiu precipe en F.R.G. havas sufiĉe da adeptoj. Oni kredas ke la ĉelmaterialo povas tuj esti utiligata de la korpo malsana por konstrui novajn ĉelojn. Sed tiuj kuracistoj nur pri tio diferencas de la "oficialaj" kuracistoj, ke ili kredas pri la efiko de la terapio. La bazajn konceptojn de la medicino okcidenta ili akceptas. Ankaŭ la manteknika terapio por korekti la vertebrojn estas terapio, kiu plene kongruas kun la oficiala medicina teorio. Nur oni kredas ke oni povas utiligi tiun terapion en multe pli da kazoj ol supozataj de la oficialaj kuracistoj. En kelkaj landoj estas samspecaj teoriaj opinidiferencoj pri iu terapio inter la medicinistoj.*
*Aliflanke oni povas diri ke kuracmetodo estas difinita sistemo de diagnostiko kaj terapio, deirante de difinita teoria-filozofia koncepto pri malsano kaj sano.*
*Povas esti, ke tia kuracmetodo estas rekte kontraŭa al la konceptoj en la regulara okcidenta medicino. Ekz.e la kiropraktiko deiras de la koncepto, ke malsanoj estas kaŭzataj de malbona pozicio de la vertebra kolono, kio influas la nervan sistemon.*
*Akupunkturo estas ankaŭ vera kuracmetodo. Ĝi havas propran diagnostikon, kiu konsistas el speciala atento al la pulso kaj diversaj aliaj eksteraj fenomenoj. (Oni diras, ke en antikva Ĉinio la virinoj ne nudigis sin antaŭ la kuracista okulo). La terapio estas ankaŭ tre diferenca de la okcidenta medicino. Kvankam akupunkturo estas parto de la ĉina natura medicino, ĝi estas integra sistemo de kuracado.*
*La antroposofia medicino, kiu baziĝas sur la ideoj de Rudolf Steiner (1861-1925), eliras de aliaj teoriaj konceptoj ol la moderna medicino. Ĝi deiras de la triobla hombildo, kiuj tri bildoj ligiĝas al la diversaj regnoj en la naturo. La sistema distingo inter mensaj, psikaj kaj korpaj aferoj estas anstataŭigata de koncepto, en kiu la menso kaj korpo estas konsiderataj kune, ne aparte. Tio konkrete ne signifas ke oni tute nuligas la atingaĵojn de la moderna medicino okcidenta, sed oni havas siajn konceptojn por "Plilarĝigi" la medicinon. (laŭ la germana "Erweiterung"). Ankaŭ la antroposofia medicino pro la teoria bazo kaj la konsekvencoj por la praktika agado de la kuracisto estas kuracometodo, ne nur terapio. La antroposofia medicino havas kelkajn specialiajn trajtojn, kiuj estas tipaj. Oni ekzemple konsideras muzikan terapion kaj ĝenerale artan terapion tre grava en la resaniĝa procezo. Oni ankaŭ konas specialan dancadon, la t.n. "eŭritmion". Antroposofiaj kuracistoj ofte rifuzas utiligi antibiotikon kaj ankaŭ vakcinado kontraŭ epidemiaj malsanoj ne estas akceptata ĝenerale. Do, se vi havos tian kuraciston, vi sciu ke en kazo de pneŭmonio, li ne volas verŝajne utiligi antibiotikon. Sed tiun riskon la paciento mem elektu.*
*La preparaĵo "Iscador" estas preparaĵo el Visko, parazita planto, konata ĉe popoloj. Oni en la antroposofiaj institutoj utiligas ĝin kontraŭ kancero, kune kun aliaj aferoj.*

*La homeopataj kuracistoj opinias ofte ke homeopatio estas "aldona terapio" al la regulara medicino. La similec-regulo "Similia similibus curantur" estas utiligata por trovi la medikamenton. Se arseno kaŭzos ke vi ekhavas diareon, arseno en "potencigita" formo estas medikamento kontraŭ diareo, aŭ ĥolero ekz.e.*
*Tamen kelkaj homeopatoj konsideras la homeopation kiel kuracosistemon kaj ne aldonan terapion pro la specifa diagnostiko k.t.p.*

*La natura kuracmetodo deiras de la principo ke per naturaj rimedoj oni stimulu la naturan resaniĝkapablon de la paciento, tiel ke la harmonio kun la ĉirkaŭa naturo kaj la kosmo estas re-establita. Oni aplikas diversajn terapiojn, kaj ankaŭ diversajn formojn de diagnostiko. Fakte la teoria bazo estas la plej grava argumento por paroli pri kuracmetodo. Tamen, ĉi tie jam estas malfacile paroli pri "kuracmetodo" kiam temas pri preskriboj por pli sana vivmaniero, kiam oni preskribas dietojn, k.t.p. La preventa aspekto, la profilaktiko, estas multe pli grava ol en la regulara medicino. Oni zorgu per sana vivado ke malsanoj estu evitataj. Tio estas tute alia elirpunkto ol la elirpunkto de la nuna okcidenta medicino, kiu tro ofte ankoraŭ estas "ripara" medicino, kaj kiu nur lastatempe pli kaj pli emfazas la gravecon de la sanaj vivkutimoj kaj -manieroj kaj -medio.*

Do, se la "kuracmetodo" estas pli celita al profilaktiko, ĉu tiukaze oni ankoraŭ povas paroli pri "kuracmetodo", ĉar fakte oni ne kuracas. Ekz.e se oni postulas repagon de kostoj por flegado en kuracbanloko, oni fakte ofte ne bone scias, ĉu oni "kuracata estas"? Ofte estas simpla metodo por retrovi la psikan ekvilibron kaj la korpan ekvilibron, eĉ se Malsano objektive ne povas esti montrata.
Tamen terapio ofte estas nur agnoskata kiel terapio se temas pri traktado de malsano.

Ĉe alternativaj kuracmetodoj ankaŭ kelkfoje oni povas demandi sin, ĉu ankoraŭ temas pri "traktado" de paciento, se tiu fakte mem faras sian terapion. Lerninte jogon, la "paciento" mem povas daŭrigi la terapion. Kaj ĉu oni vere povas paroli pri "terapio" ĉe jogo ekzemple? Taj Ĉi, specifa gimnastiko ĉina, estas iuspeca metodo por konservi sian sanon, do oni ne povas fakte paroli pri terapio, eĉ ne pri "traktadmaniero". Tio ankaŭ rilatas al aliaj konceptoj pri malsano kaj sano en diversaj kuracsistemoj, kiuj rilatas al mondkonceptoj ĝenerale.

Konklude,oni povas diri, ke alternativa kuracmetodo povas esti pli aŭ malpli alternativa, t.e. devianta de la "oficiala", "regulara" medicino. Tio dependas de diversaj faktoroj, i.a.: la mezuro laŭ kiu la teoria/filozofia bazo de kuracsistemo deflankiĝas kaj kontraŭas al la regulara medicino. Ankaŭ la grado de devieco de utiligitaj diagnostiko kaj terapio estas gravaj. Kuracmetodo alternativa, kiu estas jam sufiĉe ofte praktikata de kuracistoj povas esti pli facile "asimilata" ol metodo kiu estas preskaŭ nur praktikata de kuracantoj. Se kuracmetodo estas tute fremda al iu kulturo, tio povos kaŭzi sufiĉe da malfacilaĵoj por akcepti tiun kuracmetodon. Akupunkturo estas nun fakte por la tria fojo enkondukita en la okcidentan mondon. Unue tio okazis en la deksepa jarcento fare de nederlanda kuracisto, poste franca kuracisto en la komenco de nia jarcento enkondukis ĝin kaj post 1970a la tria enkonduko okazis.
Grava faktoro en la "regularigo" de alternativaj kuracmetodoj estas la demando kaj postuloj de la publiko. Jam fondiĝis en Nederlando asekurokompanio privata por alternativaj kuracmetodoj (nur praktikataj de kuracistoj ĝis nun). Kaj akupunkturo estas pli kaj pli repagata. Temas ankaŭ pri la kreskanta konscio de pacientoj, kiuj deziras elekti sian kuracanton (-iston) laŭ sia bontrovo kaj la kuracmetodojn laŭ sia plaĉo. Tiu batalo por libera elektebleco estas aliflanke misuzata de ĉiaj ĉarlatanoj por antaŭenpuŝi sian varon. Sed estas malfacile ofte, distingi inter bonvolo kaj ĉarlatanismo. Ankaŭ interne de la "oficiala medicino".

Fine: superrigardo pri la alternativaj kuracmetodoj, en Nederlando, 1979a:

ORIENTA MEDICINO:
Akupunkturo, Makrobiotiko, Ŝiatsu premmasaĝo (do-in); meridianmasaĝo, Oki Jogo, Taj Ĉi, orelakupunkturo, elektro-akupunkturo, orienta herba medicino, k.s.

ANTROPOSOFIA MEDICINO:
Artismaj terapioj, i.a. eŭritmio, iskadorterapio.


NATURMEDICINO BIOLOGIA MEDICINO
Nutraj terapioj (Bircher-Benner, Moerman, fastado, k.s.) alternativaj formoj de moviĝoterapioj, masaĝoterapioj, neŭralterapio , Aŭtogena trejnado, Jogo, Meditado, herba terapio, ĉelterapio, ozon-terapio, propra sangoterapio, k.t.p. Diagnostiko: Iriskopio, man- kaj ungo-diagnostiko.

HOMEOPATIO: Klasika homeopatio, kompleks-homeopatio.

PARANORMALA MEDICINO:
Klarvidkapablo, klaraŭdkapablo, magnetizado, radiestezo, rabdismo, k.t.p.

SPIRITUALISMAJ HOMKONCEPTOJ:
Perpreĝa kuracado, KRISTSCIENCULOJ, Sufi-kuracmetodo, Rozkruculoj, k.t.p.

MANTEKNIKA MEDICINO:
Kiropraktiko, Osteopatio, Manteknika terapio, k.t.p.



Eble kelkaj legantoj de la gazeto opinias ke la aŭtoro freneziĝis ĉar ja estas klare, ke tiuj metodoj estas sensencaĵoj kaj kontraŭ racia pensado. Sed ili ne forgesu ke la homo ne estas racia besto. Kaj ankaŭ la plej doktrina materialisto fine venos al filozofia necerteco.

B. de Wit.

# Pensoj pri komunikado

JUDITH JUNGER-KURPERSHOEK

Kiuj el vi ne aŭdis iun rimarkon aŭ ŝercon pri la parolemo de virinoj? Virinoj estas ĉiam klasifitaj kiel babilemaj klaĉulinoj, akompanantaj de kompatindaj viroj kiuj ne havas ŝancon eĉ malfermi la buŝon. Sed ĉu tiu bildo estas vera? Interesan, kaj parte tre originalan, vidpunkton pri la temo de virinoj kaj parolado mi trovis en la libro " Sex Differences in Human Communication" ( Seksaj diferencoj en homa komunikado) *.

Ni ĉiuj scias, ke konversacio konsistas ne nur el la parolataj vortoj (enhavo) sed ankaŭ el aliaj elementoj: laŭteco, gestado ktp., kiuj kune formas la agon de komunikado. Ni ĉiuj scias ankaŭ, ke fakte tiuj subtilaj elementoj estas tre gravaj. Ekzemple, se vi havas infanojn (aŭ okupiĝas/is pri infanoj), vi scias kiom gravas la neparola kontakto kun beboj kaj etuloj: ridado,tuŝado, la patrina vizaĝo, voĉsono,parolmaniero(trankvila aŭ nervoza). Post la infaneco, oni daŭre reagas altiuj subtilaĵoj de la komunikado, eĉ nekonscie. Kaj eĉ pli, ĉar tiuj neparolataj signaloj multobliĝas kaj fariĝas pli rafinitaj. Mi volas prezenti kelkajn, kiujn mi trovis en la ĵus menciita libro.

Jen do kelkaj rimarkoj pri la ĝeneralaj nekonscie observataj aspektoj de pervorta komunikado, rilate al kaj parolmaniero kaj enhavo,kaj al malsimilecoj inter virinoj kaj viroj.

(1) Afablaĵoj: esprimoj kun funkcio nur socia, ekz. "bonan matenon" , "kiel vi fartas", "en ordo","ĝis".

(2) Parolvico: parolaĵo de unu el la parolantoj. Ĝi klare finiĝas, kiam la parolanto silentas, eble ankaŭ indikinte per sia intonacio, ke la parolaĵo estas finita. Poste okazas tre mallonga paŭzo,komprenata de la aŭskultantoj, kaj sekvota de la komenco de nova parolvico.

(3) Reago-signaloj: mallongaj sonoj kiel "hm", "jes","mmhm", "ho" ktp. Ili signifas, ke la parolanto daŭrigu, ke oni aŭskultas kaj komprenas; do, ke oni aktive aŭskultas.(Tamen ni ĉiuj certe memoras iun tedan kaj longan paroladon, dum kiu ni aŭtomate tiamaniere reagis, tute sen aŭskulti.) Ĝenerale la reago-signalo celas: "Mi aktive komprenas vin, daŭrigu."

(4) Interrompo: kiam la aŭskultanto komencas paroli, ne ricevinte signon ke jama parolanto intencas fini. La aŭskultanto do fakte insiste silentigas la parolanton. Ekzemple:

A: Mi vidis hieraŭ televidan programon (pri)...........

B. La Nedrelandaj televidaj programoj estas.........

---

Pro ŝtopita stencilo en paĝo 6 kelkaj vortoj foje estas nelegeblaj. Temas pri "ANTROPOSOFIA MEDICINO" kaj "NATURMEDICINO BIOLOGIA MEDICINO". Petas pardonon la multobligintoj.

B klare interrompas A.
La aŭtoroj diskutas rezultojn de esploroj pri tiuj aspektoj de konversacio. Tiuj rezultoj montras, ke ja ekzistas diferencoj inter virinoj kaj viroj rilate al parolmaniero. Interrompoj en unuseksaj grupoj okazis same ofte, ĉu tiuj grupoj konsistis tute el viroj aŭ tute el virinoj. En ambaŭseksaj grupoj, tamen, 96% el la interrompoj faris la viraj partoprenantoj. Aliflanke, virinoj donis meze pli da reago-signaloj ol viroj kaj fakte la rolo de subtenanto kaj helpanto estas konsiderata tipe virina.

En konversacio, ankaŭ la silento gravas. Ĝi estas la ĉeso en la fluo de diskutado. Oni atendus, ke ĝi okazus je la fino de parolvico, kaj do ke ĝi okazus egale ofte ĉe ambaŭ partoprenantoj en konversacio inter du homoj. Sed esploroj montris, ke ĉe ambaŭseksaj paroj la virinoj silentiĝas multe pli ofte ol la viroj, kaj ke 62% el iliaj silentoj okazas post (1) manko de minimumaj subtenaj reago-signaloj kiel "mhm", "ho" de la vira aŭskultanto; (2) interrompoj de la vira aŭskultanto. Tio fakte montras ke dum interparolo la viroj malpli subtenis la virinojn ol inverse. Eĉ se ili faris tion ne tute konscie, ĝi tamen emis redukti la memfidon de la virinoj. Indas noti ankaŭ objektivan malhelpon al virinoj. Unu el la eblaj (kaj uzataj) reagoj al interrompiĝo estas simple daŭre paroli kaj fini la frazon. Sed pro la biologia fakto ke viro simple havas kutime pli malaltan kaj fortan voĉon, virino des malpli facile sukcesas batali kontraŭ lia voĉo. Fakte viroj foje konscie uzas tiun taktikon kontraŭ virinoj. Eblas diri do, ke kiam temas pri tiu subtila forma aspekto de komunikado, ekzistas malsimileco inter la du seksoj. Virinoj pli subtenas la kunparolanton (ili malpli interrompas kaj pli aktive aŭskultas)

Aliflanke viroj prenas pli da parolvicoj, emas pli ofte interrompi aŭ paroli samtempe. Do, konsiderante ke interrompoj malrespektas la parolrajton de la alia partoprenanto kaj kion tiu volas diri, la aŭtoroj opinias, ke la priskribitaj rezultoj montras, ke viroj sentas sin, kiam ili parolas kun virinoj, en alia situacio ol kun viroj, kaj ke tio fakte montras seksiman sintenon, eble nekonscian sed tamen influan.

La temo de alia esploro estis, ĉu ekzistas rilato inter la socia rango de la parolanto kaj la ofteco, laŭ kiu oni interrompas ŝin/lin. La aŭtoroj surbendigis serion de universitato-fakaj kunsidoj. Jen la rezultoj:
a. Viroj prenis meze pli da aktivaj parolvicoj ol virinoj-aliverte, parolis pli.
b. Viroj interrompis pli ol virinoj.
c. La virino, kiu plej ofte interrompis, kutime interrompis aliajn

virinojn.

c. Viroj estis ĝenerale malpli ofte interrompataj ol virinoj.

d. Rango por kaj virinoj kaj viroj estis tre grava. Partoprenantoj emis ne interrompi siajn superulojn en la hierarkio. La plej ofte interrompata estis virino, kiu hazarde estis la sola ĉeestanto sen doktoreco, kaj la plej malofte interrompata estis la prezidanto.

Kompreneble, tio estas aparta situacio. Ĉu oni povas tiri el ĝi pli ĝeneralan konkludon kaj aserti ke viroj kutime interrompas virinojn pli ofte ol virojn, ĉar virinoj havas malpli altan socian rangon kaj do estas malpli respektendaj? Tiaj rektaj konkludoj el statistiko pri psikologiaj tendencoj estas danĝeraj, sed ŝajnas al mi, ke la aŭtoroj prave konsideras ke iliaj rezultoj montras simptomojn de fundamenta seksa malegaleco.

Seksaj malsimilecoj troviĝas ankaŭ en la esprimmaniero. Viroj emas paroli pli rekte kaj pli laŭtele. Krome, ili estas pli ofte ol virinoj la demandantoj, en kiu rolo ili decidas la temojn de la konversacio kaj superregas ĝin.

Alia aspekto de la komunikado pritraktita en la libro estas la temoj de diskutoj. Ĉu vere ekzistas tipe virinaj aŭ tipe viraj temoj, kaj se jes-kio ili estas? En miksitaj grupoj, kiu enkondukas novajn temojn; kiu procento estas pli tipe vira/virina; kiuj estas la tipaj temoj, pri kiuj viroj emas paroli al virinoj kaj virinoj al viroj? En tiu ĉi mallonga prezento de la libro mi ne volas pli detale tion priskribi. Tamen, mallonge, ja ekzistas tipaj temoj: por viroj, politiko kaj sporto; por virinoj, personoj. Viroj pli emas paroli al virinoj pri tipe viraj temoj (do, konsiderataj malpli interesaj por virinoj) ol inverse.

Ankaŭ pluraj aliaj temoj estas pritraktitaj en la libro, inter ili: "virina lingvo", kiu kontrastas al tiu de la viroj pro esprimmaniero, ĝentilaj formoj, vorttrezoro, adjektivoj; kaj neparolataj diferencoj-okulkontakto inter la diskutantoj, gestado, vizaĝesprimoj ktp.

Sed la verkistoj ne kontentiĝas pri nura prezento de esploroj kaj ties rezultoj, klarigo de fenomenoj el nova vidpunkto, kaj priskribo de subtilaj interpersonaj influoj. Ili ankaŭ celas aktivigi la legantojn, por ke tiuj mem konscie analizu la situacion ĉirkaŭ si. Kelkaj praktikaj sugestoj vi trovos sur la venonta paĝo.


* Eakins & Eakins, Sex Differences in Human Communication, Houghton Mifflin Co (1978).

ĈI tiu artikolo estas transprenita el la nova kaj interesa revuo "Sekso kaj Egaleco" numero 0, okt. 79. La revuo aperas 4foje jare, kostas 8 gld kaj estas mendebla ĉe: Anna Brennan, p/a Nwe Binnenweg 197b, 3021 GA Rotterdam, ĝirkontnumero: 4112754

| Parolanto | Sekso | Aĝo | Rango kaj/aŭ profesio | Interrompis x fojojn | Estis interrompita x fojojn |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | |
| 2 | | | | | |
| 3 | | | | | |
| 4 | | | | | |
| 5 | | | | | |

(1) Interrompado en konversacio aŭ diskuto:
a. Kiu interrompas kiun? b. Kiu interrompas plej ofte?
c. Kiu estas plej ofte interrompata? ĉ. Kiamaniere sekso ludas rolon en interrompado? d. Kiun rilaton vi trovas inter socia rango k interrompado?
Por pli klare kaj facile resumi la rezultojn, vi povas ilin aranĝi laŭ la supra tabelo.
(2) Temoj aŭskultu atente kelkajn konversaciojn, laŭeble inter parolantoj de kaj la sama sekso kaj malsamaj.
a. Kiuj temoj estis plej popularaj? b. Pri kiuj temoj parolis la tute virinaj kaj tute viraj grupoj? c. Pri kiuj temoj parolis la miksitaj grupoj? ĉ. Kiu enkondukis novajn temojn? Kiu ŝanĝis la temojn?
d. Ĉu la tradiciaj stereotipoj (laŭ kiuj virinoj diskutas ĉefe receptojn, vestaĵojn kaj onidirojn, dum viroj diskutas ĉefe politikon, aŭtojn kaj sporton) estas ankoraŭ validaj? e. Kiel aĝo, okupiĝo kaj eduko influis la elekton de temoj?
Ĉu vi venos al neatenditaj konkludoj, aŭ ĉu vi simple konfirmos viajn antaŭajn supozojn, sciigu LJP pri viaj rezultoj.

---



BRAKO

En la barbirejon eniras invalido. Dum la razado la barbiro kelkfoje razvundas lin . Por iom senkulpigi sin, fine li demandas la klienton:
- Ĉu vi jam foje venis al mi?
- Ne, la brakon mi perdis en milito.

Komp/trad. Kreŝo.

En aŭgusto 1979, iom pli ol unu monaton post la diseriĝo kaj kraŝo de la usona Ĉiellaboratorio, revenis du sovetaj kosmonaŭtoj post 175 tagoj en orbito -- pli longa periodo ol pasigis, unu post alia, ĉiuj tri usonaj ĉiellaboratoriaj teamoj.

Kio okazis al la usona spacprogramo? Ĉu ĝia agado plonĝis same katastrofe kiel ĝia spacostacio? De post 1975, kiam usonaj kaj sovetaj kosmonaŭtoj renkontiĝis en la spaco, neniu usonano vojaĝis ekster la tero.

Eĉ antaŭ la surluniĝo en 1969, vidiĝis signoj de usona malentuziasmiĝo pri la kosma esplorado. Post tiu plej spektakla evento, oni ofte aŭdis asertojn kiel: "Certe, metinte homon sur la lunon, ni per simila fortostreĉo povus forigi malriĉecon... neniigi kanceron...purigi la aeron de niaj urboj...haltigi inflacion," ktp. La slogano fariĝis: "Ni zorgu pri la kosmo nur post kiam ni solvos la problemojn surterajn."

Kiun utilon alportas la kosmonaŭtiko? Du pravigojn oni ofte aŭdas de la burokratoj kaj tradiciaj apogantoj. Unu estas, ke kvankam la agado multe kostas, tiun monon oni elspezas ne en la spaco sed sur la tero, salajrante sciencistojn kaj aliajn laboristojn. Ĉi tiu argumento estus same aplikebla al la konstruado de ekz. novaj grandaj piramidoj por enteni la kadavrojn de ĉefministroj kaj ties familianoj kaj dombestoj. Homa laboro estas valoraĵo. Investi ĝin en io sen propra valoro estas malŝparo, do la menciita pravigo estas maltrafa.

La alia pravigo estas la kromproduktaĵoj, la "defalaĵoj" de la spacteĥnologio. Ekzistas multaj inventaĵoj kaj novaj substancoj, kiuj havis sian originon en la usona kosmesplora programo. (Kontraŭe al ofta aserto, teflono, la fiksrezista pattegaĵo, ne estas inter tiuj; ĝi kreiĝis lige al la jetaviado, ne la kosmonaŭtiko.) Sed se oni investus la saman monsumon, kiun oni elspezis por konkeri la spacon, en scienca esplorado por evoluigi novajn varojn, certe la rikolto estus multe pli granda ol tiu, kiun ni hazarde ricevas kiel "defalaĵoj". Ankaŭ tiu pravigo misas.

Kial do esplori la kosmon?

+

Sur ĉi tiu nia planedo, elĉerpiĝadas energio -- nu, ne vere energio kiel tia, sed jes energio en formo, kiun ni povas oportune utiligi. Iam petrolo estis pli ol abunda. Antaŭ ol oni komencis ĝin uzi kiel energirimedon, ĝi estis eĉ troa. Sed tiu tempo por ĉiam pasis. La petrolo, kiu estis facile trovebla, estas jam trovita, jam prenita, jam uzita, jam for.

Ĉu necesas mencii la "solvon", kiun prezentas la nuklea energio? La konsento estas preskaŭ universala, ke almenaŭ en sia nuna etapo la nuklea energio ne estas kontentiga kiel konstanta solvo. Daŭras la debato, ĉu akcepti ĝin eĉ kiel provizoran solvon estus troa risko al la sekura pluvivo de la homaro.

Se oportune utiligeblaj energirimedoj efektive fariĝos ĉiam pli maloftaj, ni povos antaŭvidi ĉiam pli fortajn internaciajn streĉojn pri la posedo de la malmulto, kiu restas. Lige al tio, la progreso de la nuklea teĥnologio jam de longe grandigis la rondon de ŝtatoj, kiuj posedas atomarmilojn. Sekve, esti kontenta kun malpli alta vivnivelo uzante malpli da energio, kvankam al iuj en la pli riĉaj landoj tio aspektas bona solvo, ĉesus esti bona se -- kiel tre verŝajne -- ĝin malakceptus la pli bone armitaj el la malpli riĉaj.

Bonŝance, ni posedas unu nuklean reaktoron, kiu estas sufiĉe for de loĝata tereno: meze je 150 milionoj da kilometroj. Ni ĝin nomas la suno.

nomas la suno.

Sed ekzistas problemoj pri la ekspluatado de sunenergio. Ĝi malfortiĝas (bonŝance por la ekzisto de la homaro kaj cetera surtera vivo) per filtriĝo tra la atmosfero. Kaj kvankam la sunenergio varmigas la teron dum ĉiu sekundo de ĉiu tago, tiu varmo fariĝas apenaŭ uzebla krom kiel varmo mem dum tiu parto de la tago, kiun ni nomas nokto.

Unu solvo al ĉi tiuj problemoj estus la konstruado de satelitoj, kiuj akceptus la sunenergion kaj konvertus ĝin al mikroondaj radioj, kiuj pli bone kapablus penetri la atmosferon por plia konvertiĝo al elektro aŭ alia uzebla energiformo. La satelitoj estus en tia orbito ke, unue, ili restus super unu loko sur la tersurfaco, kie estus la ekipaĵo por ricevi kaj konverti la mikroondojn; due, ĝi povus fronti la sunon konstante, eĉ kiam la riceva ekipaĵo estus en nokto.

Ĉi tiu plano estas multe esplorata, ĉefe en Usono, kvankam sen granda registara subteno ĝis nun. La plano dependas i.a. de la uzo de lunaj aŭ asteroidaj materialoj por konstrui la satelitojn, ĉar estus tro multekoste enorbitigi la materialojn ekde la tero, kun ties relative forta gravito.

+

Sed al landoj okcidentaj, kapitalismaj, ĝuste tiuj kun la industria forto por efektivigi tian entreprenon, stariĝas grandaj baroj -- baroj el tiu plej fortika substanco, papero. Temas inter alie pri la Interkonsento Reganta la Agadon de Ŝtatoj sur la Luno kaj Aliaj Ĉielaj Korpoj, pli populare konata kiel la Luno-Traktato, kiu nun troviĝas antaŭ la Ĝenerala Asembleo de UN por akcepto. La lingvaĵo de la Luno-Traktato ricevas diversajn interpretojn de la diversaj interesitaj flankoj, sed tio en si mem estas stumblilo al privata profitocela agado eksterterra, la ĉefa praktika sistemo por ekonomia ekspluatado fare de la okcidento.

Ni konsideru la jenan scenaron por la estonteco:

La prezo de petrolo grimpegas. Katastrofaj akcidentoj ĉe nukleaj reaktoroj kondukas al pli-malpli plena forlaso de la "paca atomo" kiel energirimedo. Subite formiĝas nova entrepreno, Sunradio s.a., por la konstruado de energisatelitoj. Ĝi trejnas unue laboristojn por mini la lunan surfacon, tiam aranĝas la konstruadon de surlunaj laborejoj kun ĉiuj necesaj instalaĵoj. La venonta paŝo estas laborteamoj en la spaco por rafini kaj utiligi tiujn lunajn krudmaterialojn por la partoj de la unua satelito, kaj por kunmunti tiujn partojn. Intertempe, la komunumo kontraktinta kun Sunradio s.a. konstruis ricevan antenaron. Venas la granda ŝalto-tago. Ekfluas la mikroondoj. Ĉiuj estas kontentaj.

Jen la momento, en kiu Soveta Unio protestas, ke ekonomia ekspluatado de la luno estas permesata laŭ la Luno-Traktato nur sub "internacia reĝimo", kaj ke la instalaĵoj por surluna laborado cetere ne estas rigardeblaj kiel proprieto de Sunradio s.a. nek "de kiu ajn ŝtata, internacia, interregistara aŭ neregistara organizaĵo, nacia organizaĵo aŭ neregistara jura persono aŭ de kiu ajn natura persono." Sekve, venontan semajnon UN konfiskas la tuton, disdonante la ĝistiamajn enspezojn al siaj ŝtatoj-membroj konforme al la principo, ke "La Luno kaj ties naturaj riĉaĵoj estas la komuna heredaĵo de la homaro...."

Ĉi tiu scenaro estas, kompreneble, absurde simpligita. Oni ne povas nun imagi, ke la komencaj stadioj de la komerca ekspluatado de eksterteraj rimedoj okazos simple per unu privata entrepreno, kaj se oni tion provus, interveno pro eventualaj lezoj de internacia juro sendube okazus je relative frua stadio.

Sed restas la fakto, ke ni nun starigas jurajn pricipojn, kiel ajn malklarajn, por estonteco kies praktikajn bezonojn ni ne povas nun antaŭvidi.

Diversaj sciencfikciaj rakontoj rilatas al la "terformigo" de planedoj kiel Marso kaj Venuso, t.e. al ilia transformiĝo al taŭgaj sferoj de homa vivado. La venenado de nia propra planedo tamen faras plej urĝa la terformiĝon de la tero mem. La rimedoj por tio ekzistas -- sed ne sur aŭ ene de ĉi tiu planedo. Ni ja povos konverti nian mondon al paradizo, sed la rimedojn por krei tiun paradizon ni devos serĉi -- en la ĉielo.

- - - - - - - - - - -

## FILATELISTOJ EN SAT-JUNULFAKO.

Esperantistaj geamikoj, mi anoncas al vi ke filatelia servo estas kreita en la Junulfako. Tiu servo nomiĝas: F.S.SAT-JF (Filatelia Servo de la SAT-Junulfako.)
Diversaj punktoj estas nun difinitaj:

I. F.S.SAT-JF estas helpata de filatelia franca asocio kiu nomiĝas A.P.T.: "Association Philatélique des Travailleurs" -Filatelia Laborista Asocio. Tiu asocio grupigas multajn filateliajn sekciojn en diversaj entreprenkomitatoj en Francio.

2. Mi faris kelkajn interŝanĝajn libretojn el kelkaj filateliaj donacoj, por kiuj mi multe dankas la donacintoj.

3. Tiuj interŝanĝaj libretoj cirkulos en decembro en diversaj entreprenkomitatoj, tiel la propagando estos tre bona por Esperanto. La mono rericevota por la poŝtmarkoj en interŝanĝaj libretoj servos por aĉeti aliajn novajn poŝtmarkojn por interŝanĝaj libretoj, kaj ankaŭ por helpi la diskonigon de Esperanto.

4. F.S.SAT-JF profitos interesajn prezojn por filatelia materialo kaj diverslandaj poŝtmarkoj.

5. Unu paĝo en LJP rezerviĝos por la filateliaj artikoloj, kiujn ĉiuj filateliistoj povos sendi al mi.

6. Mi pensas fari filatelian ekspozicion pri Esperanto por montri en diversaj urbaj filateliaj ekspozicioj, sed mi deziras trovi kaj aĉeti la poŝtmarkojn kaj filateliajn dokumentojn.

Mi deziras la helpon, la ideojn, la sugestojn de ĉiuj esperantistaj filateliistoj, en diversaj urboj kaj landoj, por la naskiĝo de F.S. SAT-JF. F.S.SAT-JF estos la posedaĵo de ĉiu juna esperantista filateliisto.
SKRIBU AL: Roland Tierce, 32 rue des Picottes, F-95150 Taverny.

- - - - - - - - - - -

## NI VOLAS SCII PRI SAT

Demando 13  Kian starpunkton SAT elektis en la Cina-Vjetnama milito?

Respondo  Nenian, ĉar SAT ne estas partipolitika asocio.

- - - - - - - - - - -

EN BARCELONA malfermiĝis diversaj esperanto-kursoj en mia kvartalo: Puebla Nueva, Nova Vilaĝo, kiu estas el la plej malriĉaj de Barcelono, sed ekde 20 jaroj estas tabulo kaj strato omaĝe al Doktoro Zamenhof, antaŭ du moantoj estis inaŭgurita ankaŭ malgranda placo

EN SABADELL estis malfermita denove grava avenuo de d-ro Zamenhof, kiu post la milito estis dirita " del Generalisimo Francisco Franco"; la redono de la nomo kontentigis multajn esperantistojn
Jesuo

# Ni kongresos en Rijeka 14

La venonta SAT-kongreso okazos en Rijeka, Jugoslavio. Espereble tie ĉeestos ankaŭ multaj orienteŭropaj SAT-anoj kaj simpatiuloj.
Tio ĉi sugestis al mi la ideon, ke en Jugoslavio oni devus aranĝi SAT-renkontojn en ĉiu jaro por orienteŭropanoj. Tiun ĉi landon ĉiuj geesperantistoj povas viziti sen malfacilaĵoj el la landoj de Varsovia Pakto.
Laŭ mi tre gravas, ke ankaŭ el tiu ĉi tereno aliĝu geesperantistoj al la SAT-movado. Ni devas plijunigi la membraron, ĉar la mezaĝo estas tre alta. Mi ne volas insulti la pli aĝajn SAT-anojn, ĉar iam ĉiu homo maljuniĝas, se antaŭe li aŭ ŝi ne mortas.
Sed laŭ mia sperto al nia movado mankas la juna, senlaca entuziasmo. Plej ofte nur maljunuloj laboras por SAT. La jaroj, jardekoj kuregas kaj en ĉiu jaro des pli multaj SAT-anoj forlasas nin por eterne. Ilin forrabas de ni la Morto.
Krome ili estis gejunuloj, tiam la cirkonstancoj estis tute aliaj, kiel nun. Kaj la nunajn problemojn scipovas solvi nur mem la gejunuloj. Por ĉiu estas klare, ke en Orienteŭropo estas pli multaj geesperantistoj ol en okcidentaj landoj. La kaŭzo estas trovebla en la disvastiĝo de 3-4 mondlingvoj; angla, franca, germana kaj hispana.
Ni ne evitu ĉi tiun konstaton kaj en la estonteco ni faru pli grandajn kampanjojn por la varbado de junaj SAT-anoj kaj simpatiuloj. Multaj gejunuloj interesiĝas pri SAT ankaŭ el la landoj de Varsovia Pakto. Ili vivas izolite en diversaj landoj, nesciante unu pri la alia. Sed estus tre laŭdinde kaj utile, se ili povus ekzisti organizite. Vere estas ankaŭ escepto, ekz. la nun vekiĝanta pola SAT-movado. Espereble ĝi povas ankaŭ flori kaj doni bonan ekzemplon al aliaj socialismaj landoj en Orienteŭropo.
Laŭ mi, se la gejunuloj vidos la eblecon de regulaj renkontiĝoj en iu neŭtrala lando, tiam ili amase venos al nia rondo.
Tial estus laŭdinde, se en Rijeka fondiĝus speciala labergrupo por la pli intensiva propagando al la direkto de Orienteŭropo.

LUMO.

---

PLIBONIGU LA MONDON, KOMENCU ĈE VI MEM!

Tiu ĉi slogano, bele kaj grandlitere presita sur kartono, dissendiĝis en 10.000 Ekzempleroj je la fino de februaro 1980. Oni povas pingli ĝin aŭ enkadrigi ĝin en sia salono, deĵorejo, akceptejo,......ie ajn. Ĉiun trian monaton aperos nova slogano.
Tiaj kartoj ekzistas jam de multaj jaroj en la nederlanda, franca, hispana kaj ĉina lingvoj. Temas pri iniciato de la vaste konata "Movado sen Nomo". Ĝi estas bonfara organizaĵo, kiu okupiĝas pri la morala kaj materia subteno de helpobezonaj homoj.
Dum la Zamenhoftago en 1978 la Movado sen Nomo jam startis kun Esperant-lingva telefonservo en Antverpeno (Vitaminoj por la Koro). Ĉar la sukceso estas tiel granda (kutime kvino da telefonalvokoj tage, ankaŭ el eksterlando, sed kun pintoj ĝis pli ol cent alvokoj en UNU tago) ĝi nun uzos Esperanton ankaŭ por diskonigi siajn sloganojn. Se vi volas ricevi ilin, kvarfoje en la jaro, vi tutsimple konigu vian nomon kaj adreson al: Movado sen Nomo
Korte Altaarstraat 1
B-2000 Antwerpen

# Tra la mondo iras granda radiado



Usono
Komence de oktobro okazis grandega manifestacio en Nov Jorko, al kiu partoprenis pli ol 250.000 homoj. Tamen la ministro pri energio, Charles Duncan, ankoraŭfoje deklaris sin senkondiĉa probatalanto de atomenergio.
La efikoj de la preskaŭkatastrofo en Harrisburg estas ankoraŭ senteblaj. La Nuklea Reguliga Komisiono dekretis ke novaj atomcentraloj ne plu estu konstruataj en loĝataj regionoj. Oni krome konkludis ke la estraro de la atomcentralo en Harrisburg estis nekapabla.
La posedanto de la centralo devas pagi punsumon.
Lastnomita tamen jam havas sufiĉe da zorgoj pro tio ke la "purigado" de la atomcentralo kostos verŝajne unu miliardon da guldenoj, inkl. de la rentumo pagota. La purigo postulos laŭ optimismaj taksadoj 4 jarojn, laŭ pesimismaj taksadoj 8 jarojn. 200 laboristoj bezonos pli ol 200.000 tekstilajn surtutojn, milionon da paperaj surtutoj, 100.000 pluvsurtutojn, milionon da paroj da plastaj botoj, milionon da kaŭĉukaj gantoj, 100.000 kaŭĉukajn botojn, 10.000 spongojn, 100.000 m2 da plastaj folioj, k.t.p.
nun estas en la centralo 60.000 m3 da kontaminita aero, 4 milionoj da litroj da radioaktiva akvo. Verŝajne krom tio oni povos rikolti 2000 kamionŝarĝojn da malalte radioaktiva materialo.
Plano por aĉeti insuleto en Pacifiko por" forigi" la atomrubaĵojn tie ne povis esti realigata pro tio ke la posedanto rifuzis la vendon. Jam registaroj de sud-pacifikaj landoj sin estis montrintaj maltrankviligitaj pri tiu plano.

Finnlando
Dufoje paneis konstruita de svedaj ekspertoj atomcentralo. 15 tunoj da radioaktiva akvo liberiĝis, sed tio estis nenio kompare al la antaŭa akcidento, diris la respondeculoj. Estas nun konstruitaj 4 atomcentraloj en Finnlando. 2 funkcias, la tria, de rusa tipo, ne ankoraŭ funkcias, ĉar oni konstatis fendojn en la kuvo. (Ŝajne eĉ rusaj centraloj ne estas perfektaj!) Opinisondo montris ke 58% de la finna loĝantaro estas kontraŭ atomenrgio. La rezulto mirigis kelkajn, ĉar atomenergio neniam estis varmega diskutpunkto en tiu lando, oni diras

Belgio
En Mol, kie jam estis esplorcentro oni volas ekspirimenti pri la deponado de radioaktivaj rubaĵoj en la argilaj tavoloj tie. Nederlandaj geologoj jam esprimis sian grandan maltrankviliĝon pri tiu plano, estas tute eble, ke la malpuraĵoj per grundakvo eniros Nederlandon.

Danlando
Referendumo okazos verŝajne fine de 1980a. Tion promesis la ĉefministro Jørgensen. Samkiel en Svedio, kie tiu referendumo okazos en marto 1980a.

Eŭropa Komunumaro
La EK-komisaro pri energio, Brunner, diris ke la landoj en la komunumaro tro malrapidas rilate la stimuladon de investado en atomenergio kaj karbo. Necesas ke pli da atomcentraloj, novaj karbominejoj kaj karbohejtitaj centraloj estu konstruataj.

Unuiĝintaj Nacioj

La direktoro de UNEP, la U.N.-programo pri la medio, deklaris ke la investado en "alternativaj energifontoj" estu preferata ĉe la membroŝtatoj al investado en atomenergio kaj karbo. Li diris tion pro studo farita de sciencistoj pri la efiko al la medio de diversaj formoj de energioproduktado.

Ĉinio

En februaro I980 okazis tutlanda kunveno pri la utiligo de atomenergio. Oni miris, ke ek de I964a, kiam la lando okazigis la unuan proveksplodon de atombombo, oni ne pli disvolvis atomenergion. Necesis laŭ la kunveno, ke Ĉinio kiom eble plej rapide progresu sur tiu ĉi tereno.

Jen eltiraĵoj el artikolo aperinta en la revuo "Ekoperanto", organo de Ekologia Rondo Esperantista.
La revuo estas abonebla ĉe: Bert de Wit, Leidsevaart 52, Vogelenzang, Nederlando, poŝtĝirnumero: 2703I3I.
Ĝi aperas kvarfoje jare kaj kostas 5 guldenojn.

- - - - - - - - - - - - -

ALVOKO ALVOKO

Al maljunaj geesperantistoj, kiuj pro emeritiĝo havas pli da libera tempo ol gejunuloj por dediĉi al esperanto.
Temas pri la reviglígo de esperanto en la (M.d.A.) muelejoj de metilernantoj.
Hans Bakker(Amsterdamo) kaj mi promesis unu la alian fari nian plej eblon.
La direktoro de la M.d.A. konsentis la starigon de la Esperanto-pavilono en Piot. Necesas organizado por instali gardi kaj deĵori en tiu ekspoziciejo.
Due la direktoro disponigos al ni la muelejon "Malval", tute speciale por la esperantistoj.

Ĉar bedaŭrinde la junuloj ne havas tempon por prepari tuin muelejon, mi petas la helpon de pensiuloj. Mem mi estas preta labori tie en I980 de pasko ĝis la fino de aŭgusto, sed mi ne sugestas, ke oni faru same. Plaĉus al mi, se dum tiu periodo ĉiufoje kelkaj gekamaradoj venu semajnon por labori kun mi.
Bonvolemuloj anoncu sin ĉe mi kaj kune ni planos kaj gvidos la laborojn farendajn; memstare kaj en harmonio kun niaj kapabloj.
SKRIBU al: D. Captein, Novasent' Gaydelle bas, St. Pastour, F 47290 Cancon, Francio. Tel: (58) 0I 67 8I

- - - - - - - - - - - - - -

MENDU MENDU MENDU MENDU MENDU MENDU MENDU MENDU MENDU




Tiu ĉi butono vi povas mendi ĉe:
Bert de Wit, Leidsevaart 52, Vogelenzang, Nederlando, poŝtĝirnumero: I709325.
La butono kostas I.50 guldenojn inkluzive afrankon.

# PROTOKOLO PRI LA PACISTA FRAKCIO

dum la periodo inter la kongreso de Lektur kaj la kongreso de Suanik'

## Membraro

40 gekamaradoj el 7 ŝtatoj de Eŭropo kaj Ameriko ĉeestis la pacistan kunvenon en Lektur' kaj kolektive donis kotizon. Poste la sekretariino akceptis kiel korespondanton de la frakcio Esperanto-lernanton, kiu ne povis frakcianiĝi, ĉar li ankoraŭ ne estis SAT-ano.

La frakcio dum tiu jaro havis sekcion en Katalunio, kies delegito estis k-do Moya Escayola.

## Rubrikoj

- La rubriko en Sennaciulo utilis ĉefe por aperigi adresojn de enkarcerigitaj armerifuzantoj. Finfine, la sekretariino ricevis el Bruselo respondon de la Internacio de Militrezistantoj, kaj abonis ĝian informilon nome de la frakcio. El ĝi estis tiritaj adresoj, sed pri aliaj kamaradoj ŝi estis informita per neperfortaj gazeton el pluraj landoj. Aperis ankaŭ diversaj informoj pri porpacaj movadoj en la mondo.
- pri la rubriko en LJP zorgis pri la enhavo k-ino Lépeix, pri la tajpado k-ino Paliot. La longtempe dezirata debato pri unuflanka malarmado povis okazi. Tiucele, la sekretariino kontaktis la ligon por unuflanka malarmado de Italio, kun kia nia frakcio havas nun regulan rilaton.

## Broŝuroj

Kompreneble, la broŝurservo de SAT plu akceptas verkojn pri paco, sed la pacista frakcio mem ne plu financas eldonadon de broŝuroj. Necesas malaperigi, prefere per vendado, la stokon da broŝuroj, kiuj apartenas al la frakcio, kaj kiuj nun troviĝas en Strasburgo ĉe k-ino Lépeix. Aĉeteblaj ĉe k-ino Lépeix, 82 avenue Jean-Jaurès, F 67100 STRASBURGO, estas la jenaj broŝuroj :

. Ĉu armeo aŭ civila, neperforta defendo ?
. Léon BAZALGETTE : Henry-David Thoreau.
. Henry-David THOREAU : Civila malobeemo.
. Leĝpropono por unuflanka malarmiĝo de Francio.
. Rolando LEVREAUD : Atomcentraloj.
. La BOESI : Memvola servuto.
. Aharon COHEN : Paco en proksima oriento.
. Teodoro EBERT : Ĉu neperforta revolucio aŭ revolucia liberiga milito ?
. Por la paco, kontraŭ la milito (citaĵoj de eminentuloj).
. Henri MASSON : Linguistique et non-violence.

Sendu mendon al K-ino Lépeix kaj pagu post ricevado de la fakturo.

## Solidaragadoj

La sekretariino estis gvidata de sia konvinko, ke la utilecon de Esperanto oni pruvas ĝin uzante.

La frakcianoj ricevis proponojn pri solidaragoj pri pacistoj en konfliktoj kun aŭtoritatoj, kaj protestkartojn eldonitajn de Larzak-defendantoj kaj resendotajn al sinjoro Giscard d'Estaing. La sekretariino ricevis de k-do HIROSE Sinji, al kiu ŝi estis sendinta unu el tiuj kartoj kun klarigo kaj traduko en Esperanto, gazeton en la por ŝi nekomprenebla japana lingvo, sur kiu ŝi povis vidi foton de tiu karto. Ŝi sendis tiun japanan gazeton al la kamparanoj de Larzako.

Kiel kutime, salutkartoj estis senditaj al la armerifuzantoj, kies adresoj aperis en Sennaciulo, kaj al aliaj, kies adresoj ne aperis, ĉar ili estis baldaŭ liberigotaj, kiam la informo alvenis al la sekretariejo.

## Aliaj kontaktoj

Nia frakcio interŝanĝas LJP por la itala gazeto "Satyagraha", kaj ricevas la svisan franclingvan gazeton "Rebrousse-poil".

La pacista frakcio havas kamaradecajn rilatojn kun aliaj frakcioj kaj fakoj de SAT, ĉefe la junulfako kaj la liberecana frakcio.

Unuiĝintaj Nacioj

La direktoro de UNEP, la U.N.-programo pri la medio, deklaris ke la investado en "alternativaj energifontoj" estu preferata ĉe la membroŝtatoj al investado en atomenergio kaj karbo. Li diris tion pro studo farita de sciencistoj pri la efiko al la medio de diversaj formoj de energioproduktado.

Cinio

En februaro I980 okazis tutlanda kunveno pri la utiligo de atomenergio. Oni miris, ke ek de I964a, kiam la lando okazigis la unuan proveksplodon de atombombo, oni ne pli disvolvis atomenergion. Necesis laŭ la kunveno, ke Cinio kiom eble plej rapide progresu sur tiu ĉi tereno.

Jen eltiraĵoj el artikolo aperinta en la revuo "Ekoperanto", organo de Ekologia Rondo Esperantista.
La revuo estas abonebla ĉe: Bert de Wit, Leidsevaart 52, Vogelenzang, Nederlando, poŝtĝirnumero: 2703I3I.
Gi aperas kvarfoje jare kaj kostas 5 guldenojn.

- - - - - - - - - - - -

ALVOKO ALVOKO

Al maljunaj geesperantistoj, kiuj pro emeritiĝo havas pli da libera tempo ol gejunuloj por dediĉi al esperanto.
Temas pri la revigligo de esperanto en la (M.d.A.) muelejoj de metilernantoj.
Hans Bakker(Amsterdamo) kaj mi promesis unu la alian fari nian plej eblon.
La direktoro de la M.d.A. konsentis la starigon de la Esperanto-pavilono en Piot. Necesas organizado por instali gardi kaj deĵori en tiu ekspoziciejo.
Due la direktoro disponigos al ni la muelejon "Malval", tute speciale por la esperantistoj.

Car bedaŭrinde la junuloj ne havas tempon por prepari tuin muelejon, mi petas la helpon de pensiuloj. Mem mi estas preta labori tie en I980 de pasko ĝis la fino de aŭgusto, sed mi ne sugestas, ke oni faru same. Plaĉus al mi, se dum tiu periodo ĉiufoje kelkaj gekamaradoj venu semajnon por labori kun mi. Bonvolemuloj anoncu sin ĉe mi kaj kune ni planos kaj gvidos la laborojn farendajn; memstare kaj en harmonio kun niaj kapabloj.
SKRIBU al: D. Captein, Novasent' Gaydelle bas, St. Pastour, F 47290 Cancon, Francio. Tel: (58) OI 67 8I

- - - - - - - - - - - - -

MENDU MENDU MENDU MENDU MENDU MENDU MENDU MENDU MENDU




Tiu ĉi butono vi povas mendi ĉe:
Bert de Wit, Leidsevaart 52, Vogelenzang, Nederlando, poŝtĝirnumero: I709325.
La butono kostas I.50 guldenojn inkluzive afrankon.

# PROTOKOLO PRI LA PACISTA FRAKCIO
## dum la periodo inter la kongreso de Lektur kaj la kongreso de Suanik'

Membraro

40 gekamaradoj el 7 ŝtatoj de Eŭropo kaj Ameriko ĉeestis la pacistan kunvenon en Lektur' kaj kolektive donis kotizon. Poste la sekretariino akceptis kiel korespondanton de la frakcio Esperanto-lernanton, kiu ne povis frakcianiĝi, ĉar li ankoraŭ ne estis SAT-ano.

La frakcio dum tiu jaro havis sekcion en Katalunio, kies delegito estis k-do Moya Escayola.

Rubrikoj

- La rubriko en Sennaciulo utilis ĉefe por aperigi adresojn de enkarcerigitaj armerifuzantoj. Finfine, la sekretariino ricevis el Bruselo respondon de la Internacio de Militrezistantoj, kaj abonis ĝian informilon nome de la frakcio. El ĝi estis tiritaj adresoj, sed pri aliaj kamaradoj ŝi estis informita per neperfortaj gazeton el pluraj landoj. Aperis ankaŭ diversaj informoj pri porpacaj movadoj en la mondo.
- pri la rubriko en LJP zorgis pri la enhavo k-ino Lépeix, pri la tajpado k-ino Paliot. La longtempe dezirata debato pri unuflanka malarmado povis okazi. Tiucele, la sekretariino kontaktis la ligon por unuflanka malarmado de Italio, kun kia nia frakcio havas nun regulan rilaton.

Broŝuroj

Kompreneble, la broŝurservo de SAT plu akceptas verkojn pri paco, sed la pacista frakcio mem ne plu financas eldonadon de broŝuroj. Necesas malaperigi, prefere per vendado, la stokon da broŝuroj, kiuj apartenas al la frakcio, kaj kiuj nun troviĝas en Strasburgo ĉe k-ino Lépeix. Aĉeteblaj ĉe k-ino Lépeix, 82 avenue Jean-Jaurès, F 67100 STRASBURGO, estas la jenaj broŝuroj :

. Cu armeo aŭ civila, neperforta defendo ?
. Léon BAZALGETTE : Henry-David Thoreau.
. Henry-David THOREAU : Civila malobeemo.
. Leĝpropono por unuflanka malarmiĝo de Francio.
. Rolando LEVREAUD : Atomcentraloj.
. La BOESI : Memvola servuto.
. Aharon COHEN : Paco en proksima oriento.
. Teodoro EBERT : Cu neperforta revolucio aŭ revolucia liberiga milito ?
. Por la paco, kontraŭ la milito (citaĵoj de eminentuloj).
. Henri MASSON : Linguistique et non-violence.

Sendu mendon al K-ino Lépeix kaj pagu post ricevado de la fakturo.

Solidaragadoj

La sekretariino estis gvidata de sia konvinko, ke la utilecon de Esperanto oni pruvas ĝin uzante.

La frakcianoj ricevis proponojn pri solidaragoj pri pacistoj en konfliktoj kun aŭtoritatoj, kaj protestkartojn eldonitajn de Larzak-defendantoj kaj resendotajn al sinjoro Giscard d'Estaing. La sekretariino ricevis de k-do HIROSE Sinji, al kiu ŝi estis sendinta unu el tiuj kartoj kun klarigo kaj traduko en Esperanto, gazeton en la por ŝi nekomprenebla japana lingvo, sur kiu ŝi povis vidi foton de tiu karto. Si sendis tiun japanan gazeton al la kamparanoj de Larzako.

Kiel kutime, salutkartoj estis senditaj al la armerifuzantoj, kies adresoj aperis en Sennaciulo, kaj al aliaj, kies adresoj ne aperis, ĉar ili estis baldaŭ liberigotaj, kiam la informo alvenis al la sekretariejo.

Aliaj kontaktoj

Nia frakcio interŝanĝas LJP por la itala gazeto "Satyagraha", kaj ricevas la svisan franclingvan gazeton "Rebrousse-poil".

La pacista frakcio havas kamaradecajn rilatojn kun aliaj frakcioj kaj fakoj de SAT, ĉefe la junulfako kaj la liberecana frakcio.

## Financa raporto

| | |
|---|---|
| **Enspezoj** | |
| La frakcio posedis en Lektur' | 291,35 FF |
| Monkolekto + pago de broŝuroj en Lektur' | 157,80 FF |
| Kotizo | 2,60 FF |
| Pago de broŝuroj menditaj en Lektur' | 11,84 FF |
| **Elspezoj** | |
| Pago de broŝuroj al la broŝurservo | 20 FF |
| Poŝto por frakciaj aferoj | 24,05 FF |
| Solidaragoj | 102 FF |
| Abonoj al pacistaj gazetoj | 42 FF |
| | 188,05 FF |

Restis en la kaso en Suanik' : 275,54 FF.

Car la nova strukturo de la frakcio ne plu ampleksas centran kason, la frakcianoj decidis en Suanik' donaci tiun sumon por Larzako.

La eks-sekretariino: J. Lépeix

---

## Dekreto de la konsilantaro de popolkomisiitoj

1. Ni ordonas ke, per decido de la popoltribunalo, estu konsentata al ĉiu persono ne povanta partopreni en militservo pro religiaj konvinkoj la rajton ĝin anstataŭi, por la daŭro de la servo de samaĝaj militservantoj, per servo kiel sanisto plenumenda prefere en malsanulejoj por kontaĝaj malsanuloj, aŭ per alia publike utila laboro, laŭ elekto de la servonto.
2. Antaŭ ol decidi la anstataŭadon de militservo per civila servo, la popoltribunalo petas por ĉiu aparta kazo enkedon de la unuigita konsilantaro de Moskvo pri religiaj societoj kaj grupoj. La enkedo devas montri, ĉu la religiaj konvinkoj de la servonto eskludas partoprenon en militservo, kaj ĉu la servonto agas sincere kaj kun bona konscienco.
3. La unuigita konsilantaro por religiaj societoj kaj grupoj rajtas escepte, post unuanima decido, entrepreni paŝojn ĉe la prezidantaro de la tutrusa plenumkomitato por tuta liberigo el la militdevo sen anstataŭa civila servo, se ĝi povas nepre pruvi la neakordeblecon de tiu anstataŭa servo kun la religiaj konvinkoj de la devanto, kun la religia literaturo de la koncernata sekto kaj kun la privata vivo de la devanto.

Rimarko : la metado de peto pri liberigo el la militdevo estas rajto de la servonto mem same kiel de la unuigita konsilantaro de Moskvo pri religiaj societoj kaj grupoj, tiu lasta rajtas entrepreni paŝojn por ekzamenado de la afero ĉe la popoltribunalo en Moskvo.

La prezidanto de la konsilantaro de la popolkomisiitoj : V. Uljanov (Lenin')

La estro de la administracia servo de la konsilantaro de la popolkomisiitoj : V. Bronĉ-Brujeviĉ

La 4an de januaro 1919, Moskvo, Kremlo.

Publikigita en la kolektaro de leĝoj kaj reguloj de la laborista kaj kamparana registaro la 20an de majo 1919, n° 19, kaj en la gazeto de la popolkomisiito pri la armeo la 16an de januaro, n° 10 (Isvesja).

---

## VIVO DE S.A.T.-JUNULFAKO

La neregula apero de LJP tre ĝenas la vivon de la SAT-JF. Ni reciproke ricevas malmultajn raportojn pri la agado de la membroj, pri kiu foje venas nur konfuzaj informoj per malrektaj vojoj. Certe en Rijeka venos kelkaj, i.a. la raportoj de la perantoj, jare postulataj en la JF-regularo. Dezirinde estas ke plej multaj JFanoj (kial ne ĉiu?) raportu pri sia agado.

La nuna situacio de LJP plej krude vokas transprenon de la prizorgado fare de nova skipo. Per tiu ĉi numero finiĝas malsukcesa sperto, ke rondiru la redakcio. Nepras trovi alian solvon.

Tamen montriĝas, ke la agado plu efikas, novuloj SATaniĝis, inter kiuj la junuloj bone proporcias. Disvolviĝas la rilatoj kun eksterSATaj junEorganizoj: SAT-JF-reprezentantoj estis invititaj al TEJO- kaj PSEK-aranĝoj, TEJO- kaj PSEK-reprezentantoj estas atendataj en Rijeka, kontaktoj estiĝas kun HEJ kaj GEJ (resp. Hungara kaj Germana E-Junularo).

Pliaj informoj en venonta LJP!

JFK, julio 1980.

---

Directeur de la Publication: Baudé. Imprimeur: Lévy, 67 av. Gambetta, F 75020 PARIS.